


SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA
SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO!

Sennaciulo

Sennaciulo estas la oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

<http://www.satesperanto.org/>

septembro - oktobro 2010, n-ro 9 -10 (1263 - 1264)



SAT-Kongreso 2011 Sarajevo

Dokument-filmo pri Esperanto

Dokument-filmo pri Esperanto: jam preskaŭ fin-filmita, sed plu diskonigenda!

Kiel vi jam legis en la agadraporto de la majojunia Sennaciulo, la Eldona Fako Kooperativa de SAT (SAT-EFK) ekigis ambician projekton : temas pri la produktado de profesia dokument-filmo pri la esperantista movado.

La kooperativo dungis la reĝisoron Dominiko Gaŭtiero (Dominique Gautier) por verki tiun filmon.

En ĉi tiu projekto la kooperativo estos produktanto, sed la filmon aŭtoros la reĝisoro, Dominiko Gaŭtiero. La filmo do transdonos lian vidpunkton pri nia movado, kiun li malkovras dum la filmado. Ni ne celas produkti memreklaman aŭ propagandan filmon. Laŭ ni tio estas la ĉefa kondiĉo, por ke ĝi ricevu veran eĥon antaŭ la publiko.

Kia enhavo?

La reĝisoro priskribas la scenaron jene:

“Kun sia historio, sia spirito, sia klopodo, sia ideologio, Zamenhofo estas persono ne ordinara. Laŭ filmarta vidpunkto, temas pri “heroo”, kiu vekas intereson kaj simpatian. La filmstrukturo konstruiĝas sur bazo de la historio de Esperanto kaj ties elpensinto. Ĉiuj gravaj eroj de la historio resendas al antaŭa situacio.

Pritrakti la historion de Esperanto laŭlonge de la filmo donas plurajn avantaĝojn: malkovrigi la historion sen enui per tro longa sekvenco, ligi tiun historion kun la nuno, la klopodon de Zamenhofo kun la hodiaŭa aktivismo, malpeze elvoki la organizadon de la movado kun ties strukturo, montri kiel la utopio de Zamenhofo troviĝas en la realo, lin paroligi per citaĵoj, eksterbilde luditaj far aktoro, reliefigi la indecon kaj la adaptiĝon de Esperanto al la moderna mondo, formale ludi per etosaj kaj ritmaj ŝanĝiĝoj.

La elekto de la ĉefaj temoj traktitaj en tiu doku-

mentfilmo ebligas atesti pri la hodiaŭa vivo de Esperanto: la internacia komunikado, la origino de Esperanto, ties kreado kaj la celoj de L. Zamenhofo, la lingva strukturo, la lernado, la ideologio, la Kongresoj intaj kaj nunaj, la movada organizado, la kultura produktado, la evoluado de la lingvo kaj ties diversaj uzoj (kunvenoj kaj kolokvoj internaciaj, vojaĝoj, gepatra lingvo...), ties agnosko far internaciaj instancoj kaj far intelektuloj, la estonto de Esperanto (la esperoj kaj la komencitaj agoj).

La universalan dimension alportos la sekvencoj filmitaj en diversaj landoj kaj uzo de multnombraj atestoj de diversnaciaj esperantistoj.

La materioj uzataj por ĉi filmo kutimas por dokumentfilmo : filmitaj kunparoladoj, ĝeneralaj ilustradoj, apartaj situacioj, eksterbilda komento, aŭtoraj citaĵoj per aktora voĉo, arkivaj fotoj, filmoj malnovaj aŭ freŝdataj, video-produktoj, gravuraĵoj, son-arkivoj, sed ankaŭ grafikaĵoj kaj animacio, por pritrakti kelkajn sekvencojn, kiel ekzemple la lingva strukturo.

La muzika ilustrado ĉerpiĝas el la riĉeco de la produktado kaj eldonado esperantistaj.

Por kongrui kun sia celo, la filmo baziĝas sur travivitaj situacioj, emoci- kaj signifplenaj, kaj atestantaj je humanista spirito. La filmitaj kunparoladoj proponas individuajn klopodojn kaj spertojn, komplemetojn, klarigojn aŭ analizojn pri iuj historiaj aŭ nunaj faktoj, kaj la eldiroj de iuj “fakuloj”.

Jam preskaŭ finiĝis la filmado

La filmado komenciĝis dum novembro 2009.

Dominiko Gaŭtiero vizitis Bjalistokon dum 9 tagoj. Li ankaŭ ĉeestis la registradon de kanto de JoMo por la “Afrika Kompilo” en la registrejo de Vinilkosmo, ĉeestis prelegon de Hori Jasuo en sudfrancia vilaĝo kaj esperantistan kafumadon en Parizo. Poste li vizitis la kongreson de SAT-Ami-



Sennaciulo

OFICIALA ORGANO DE S.A.T.

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05; telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.

Free: +33.9.50.71.01.97; Retadreso: satesperanto@free.fr.; TTT-paĝoj: <http://www.satesperanto.org>; Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.

IBAN : FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064

BIC: PSSTFRPPPAR

Konto de SAT ĉe UEA : satx-s

Plenum-Komitato de SAT :

Prezidanto : Jakvo Schram

Ĝenerala Sekretario : Vinko Markovo

Kasistino : Thérèse Sabatier

Membroj: Guy Cavalier, Gérard Lieblang, Franjo Leveque-

Provost, Arturo Prent.

Redaktantoj - Kreŝo Barkoviĉ, Robin Beto, Tonyo Del Barrio, Jomo Ipfelkofer, David Kelso, Djemil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Vito Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Serge Sire, Franciska Toubale. Enpaĝigas Jakvo.

Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de S.A.T.

Tekstojn vi sendu al: Sennaciulo@telenet.be - aŭ al Jakvo Schram Hof ter Bekestraat 49. BE-2018 Antwerpen

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par : TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel. Le directeur de la Publication: Jacques Bannier; Abonnement annuel/jara abono France 55 €.

Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.

Dépot légal à la date de parution. N° CPPAP 0510 G 86567

Novaliĝoj

35926 STRIDE Philippe, La Jossais, FR-22490 PLESLIN-TRIGAVOU, Francio

35927 DOS SANTOS FERREIRA Rogerio, Av. Diogo de Azevedo, 22, ap. 102 A, Vila Antonio, BR-05376-140, SAO PAULO-SP, Brazilo

35928 BLANCHAIS Jean-Marc, 23 rue de la Forge Royale, FR-75011 PARIS, Francio

35929 ARQUILLOS LOPEZ Ángel, C/ Ánfora, 6-5-D, ES-29013 MALAGA, Hispanio

35930 FERREIRA DE AVELLAR Evandro, Rua Ipe Amarelo – Lote 06 – Apt. 1104, BR-71937-360 AGUAS CLARAS – BRASILIA/DF, Brazilo

35931* BURGOS MATAMOROS My lai, Priv. de Chimalistac 42 G-703, Copillo El Bajo, Del. Coy, Mexico DF, MX-04340 MEXICO,

35932 CORDOVA ARELLANO Luis L., Priv. de Chimalistac 42 G-703, Copillo El Bajo, Del. Coy, Mexico DF, MX-04340 MEXICO, Meksiko

35933 MIRO Leysester, Rua Sinimbu, 568-Ap8 Bairro Lourdes, BR-95020-000 CAXIAS DO SUL-RS, Brazilo

35934* DE LORENZI Carla, Via Boston, 65, IT-10137 TORINO, Italio

35935 KIERES Bronislaw, str. Myckowskiego 17/3, PL-31-158 KRAKOW, Pollando

35936 SEDGLEY Miĥaelo, Stoyanka Drandeva, kv "Dame Gruev" 6-V-25, BG-8100 SLIVEN, Bulgario

35937 REDFARN Peter, 14 Box Tree House Gosterwood St, GB-SE8 5PA LONDON, Britio

Nekrologo

La 31-an de majo 2010 mortis en Zwolle (Nederlando) 92-jara k-dino Anneke Ter Braak (matr. 21503). Ni kondolencas al la familianoj kaj amikoj.

La 4-an de junio 2010, en la aĝo de 80 jaroj forlasis niajn vicojn k-do Vlado Sládeček (matr. 31488).

Vlado naskiĝis la 17-an de marto 1930. Dum la pasinta komunista reĝimo li estis ofte persekutata de la ŝtata sekreta polico pro siaj E-rilatoj tutmondaj. Li, simpla laboristo atingis multajn sciojn pri astrologio, naturkuracado kaj tradukadis el la germana, pola kaj Esperanto en la ĉeĥan. Multaj gekamaradoj konatiĝis persone kun li dum SAT-kongreso en Kaunas en 1992, kiun li atingis post aventurplena vojaĝo per sia aŭtomobilo Trabant.

La 13-an de Junio 2010 mortis 93-jara k-do Petro Dehan (matr. 20706).

Li aktivis multe por kaj per Eo de antaŭ la 2a mondmilito. La lastajn jarojn li ne plu povis fari multon por nia movado pro sia malbona vidkapablo sed mense restis sufiĉe vigla ĝis la fino. Ni ja perdas afablan, kleran, kaj sindoneman kamaradon.

La aŭstria Kamarado Leopold Patek informis nin pri la forpaso de

Rudolf JAX (1959-2009) (matr. 32828) mortis la 18-an de decembro 2009 en Salsburgo (Aŭstrio).

Post la forpaso de Rudolf JAX, Leopold PATEK estas la ununura membro de SAT en Aŭstrio.

Dokument-filmo pri Esperanto

Daŭrigo de paĝo 2

karo en Hiliono, la franc-germanan renkontiĝon de Kajzerslaŭterno, la Internacian Esperantistan Muzeon en Vieno, kaj Centron de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo Internacia (CDELI) en Ĉaŭdefono.

La somero provizis plian materialon por filmado. Dek horoj da registraĵoj estis kolektitaj dum la Universala Kongreso en Havano. Tion kompletigis filmado dum la SAT-Kongreso en Braŝovo, dum la Internacia Junulara Renkontiĝo en Peĉo, kaj dum la muzika festivalo FESTO apud Tuluzo, kaj en la kulturcentro Greziljono.



Lastaj bildoj estos kaptitaj en septembro dum la Homara Festo, apud Parizo, kaj en hungara lernejo, kie la infanoj studas Esperanton. Poste okazos muntado, tradukado, kaj la finita filmo devus esti preta por la Internacia Renkontiĝo Esperantista ĉe Mediteraneo okazonta en Seto en aprilo 2011 (22-26), dum kiu okazos interalie la kongreso de SAT-Amikaro.

Kio fariĝos per la materialo?

Estas klare, ke estis kolektita entute multe pli da materialo ol uziĝos efektive en 52-minuta, aŭ eĉ

iom pli longdaŭra dokument-filmo. Tamen, la cetera materialo ne iros rubujen. Ĝi estos zorge konservita, almenaŭ en komputila formato, kaj povus esti reekspluatita pli poste por produkti pli fakan aŭdovidan materialon. Sed tio ankaŭ havos koston, kaj ĉi tiu plena ekspluatado eblos nur se la baza versio de la filmo bone disvendiĝas.

Kiel helpi la projekton?

Vi povas antaŭmendi la filmon je la prezo de 18 eŭroj por privata uzo, aŭ eĉ pli bone, aĉetigi ĝin de via loka grupo je la prezo de 40 eŭroj, por senpaga publika projekciado. Organizado de tia projekciado ja postulas laboron, kaj estas iom nekutima tasko, sed tio estas la plej bona maniero ekfunkciigi aŭ

revivigi SAT-rondon: en tia projekto SAT-anoj devus povi facile ricevi la kunlaboron de aliaj esperantistoj, kaj la varba efiko de tia kunveno devus ankaŭ helpi al produktado de pliaj esperantistoj, inter kiuj eble kelkaj fariĝos SAT-anoj.

Ankaŭ estos bezonataj, inter oktobro kaj decembro, tradukistoj por subtitoligi en naciaj lingvoj. Ja la filmo estos dublita de profesiaj aktoroj en la ses lingvoj de UNO (Angla, Araba, Ĉina, Franca, Hispana kaj Rusa) kaj en Esperanto. Sed eĉ por tiuj ĉi lingvo subtitoloj - kaj do tradukantoj - estos bezonataj por la intervjuoj de esperantistoj, kiujn estus sence dubli. Por la aliaj lingvoj, estas dezirinde, ke la landaj aŭ regionaj asocioj, kiuj deziras aldoni tradukon, ankaŭ mendu kelkajn diskojn.

Pliaj informoj regule aperas ĉe la retejo: <http://esperantofilmo.com/> Mendilon vi ricevis kun ĉi tiu numero de Sennaciulo.

Pliaj informoj regule aperas ĉe la retejo:

<http://esperantofilmo.com/>

Mendilon vi ricevis kun ĉi tiu numero de Sennaciulo.

Vinko Markovo

